

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №1



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №1 (319)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2024

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2024, №1 (319).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 3 апреля 2024 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Rekorda sumo de donacoj en 2023	5
Eventoj	6
Cyril Schultz. TEJO-volontulo pri la 14a JES en Germanio	7
Andreas Diemel. La oka Luminesk' sur nordmara insulo Norderney	9
Luigi Fraccaroli, Debora Rossetti, Lu Wunsch-Rolshoven. "Esperanto parolata": La 20a NR en Wiesbaden	10
Teddy Nee. Novjara Esperanto-Kunveno 2024 en Tajvano	11
Ulrich Matthias. Kristana Esperanto-Seminario en Malagasio: Harmonia, sukcesega, ripetinda	12
Bharat K. Ghimire. La 14a Himalaja Renkontiĝo en Nepalo	14
Prakash Khadka. Alia mondo eblas: Esperanto en Monda Socia Forumo	16
Liba Gabalda. Mediteranea Esperanto-Semajno 2024	18
Jean-Luc Thibias. La tria Bunta Esperanto-Tago	20
Jorgos. La 31a korusa staĝo kun tri "unuafoje"	20
Foppe-Klaas Honvinga. Bibliaj Tagoj 2024	21
Jürgen Wulff. Gramatika esploro kun infanliteraturo en Hamburgo	23
Tiina Oittinen. Finnlando: Vintraj Tagoj 2024	24
Irina Gončarova. La 17a Antaŭprintempa Esperanto-Renkontiĝo	25
Wu Guojiang. Alvenas novepoka printempo de Esperanto	27
Povilas Jegorovas. Zamenhof-ekspozicio: unika projekto en Litovio	29
Arikapalli Giridhar Rao. Tago de la gepatra lingvo: Barataj afiŝoj plurlingvaj	30
Latifou Gbadamassi. Pli ol cent knabinoj lernas Esperanton en Benino	31
Zhao Wenqi. Kurso en Pekina Lingva kaj Kultura Universitato	32
Jaes Estrada. Literaturkurado dum la dua Literatura Duonmaratono	33
Aleksander Korĵenkov. Pli ol 400 aliĝintoj al la unua Afrika UK	34
Ethiopian Airlines: Oficiala flugkompanio de UK-109	34
Aperis la Dua Bulteno de la 109a UK en Aruŝo	34
La 110a UK okazos en Brno post unu jaro	35
Povilas Jegorovas. En 2025 BET okazos en Kaŭno	36
Dennis Keefe. Longe kongresi en Hispanio	37
Povilas Jegorovas. Litovio: La printempa kunflugo proksimiĝas	38
La Brita Kongreso 2024: Memore al Marjorie Boulton	39
Kvarobla kongreso en Serbio	40
Relanĉo de la Danuba rendevuo	41
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	41
Tribuno	42
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago	43
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago por Eliminado de Rasa Diskriminacio	43

Edukado.net: La provekzamenoj progresas.	44
Irina Gončarova. Esperanto-Poŝtkruciĝo – sep jaroj da amikeco.	45
Konatiĝu kun la konfidencpersonoj de TEJO.	46
SAT baraktas en grava krizo.	48
Alvoko de ILEI por la kongresoj 2025 kaj 2026.	48
Arkivo	49
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2024.	50
Aleksander Korĵenkov. Antaŭ 45 jaroj: Ne nur pri Esperanto.	52
Kulturo	54
Aleksander Korĵenkov. En Grinlando ie... ..	55
Aleksandr Grin. La pilorio. Norte kaj tage. La parolema koboldo. La edziĝo de Aŭgusto Esborn. La akvarelo. La komandanto de l' haveno (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova).	57
Paulo Sérgio Viana. Preskaŭ blinda.	89
Laimundas Abromas. La pilgrimado al Bjalistoko.	91
Miguel Fernández. Nuntempa hispana poezio: Armando Silles McLaney.	98
Poemoj de Armando Silles McLaney.	100
Aleksander Korĵenkov. Denove 100 libroj. Sen Britio.	106
Wolfgang Kirschstein. Kaj la Oskaro venas al... ..	110
Carlo Minnaja. Fantazio, realo kaj medito (Recenzo: Italo Calvino. <i>La kosmocomikoj; Palomar</i>).	114
Halina Gorecka. Amhistorio kun trista finalo (Cho Sung Ho. <i>Bunsun kaj Aiko: Rememore al Mia Unua Amo</i>).	116
La 2022a jaro kiel limdato en nia literaturhistorio.	117
Eurovizio kaj Esperanto.	118
Floréal Martorell, Aleksander Korĵenkov. <i>Stacioj de l' amo</i> aperis je la Tago de Sankta Valentino.	119
Floréal Martorell, Aleksander Korĵenkov. <i>Bela vivo: La dua bitalbumeto de TIM</i>	120
La 14a literatura konkurso "Esperanto ligas homojn".	121
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako, 2023, №48</i>	122
Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero: La voko de la arbaro</i>	123
<i>Literatura Foiro, 2024, №327</i>	124
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>La Ondo de Esperanto: 1500+ tagoj da ĉiutaga reta informado!</i>	125
Mozaiko	126
Stanislav Belov. Nesperioze pri elektoj kaj balotoj.	127
István Ertl. Spiritaj splitoj kaj preskeraroj.	128
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	129

Kovropaĝe: "Harmonia, sukcesega, ripetinda" nomis la Kristanan Esperanto-Seminarion en Malagasio Ulrich Matthias. Legu lian artikolon (p. 12-13).

Rekorda sumo de donacoj en 2023

Por la abonjaro 2023 ni ricevis donacojn de kvar patronoj kaj 30 amikoj (unu el la amikoj ebligis abonon al tri personoj), danke al kiuj 32 personoj dum la tuta jaro povas ĝui la legadon de *La Ondo de Esperanto*. (En 2020 estis kvar patronoj kaj 18 amikoj, en 2021 – tri patronoj kaj 27 amikoj, en 2022 – kvar patronoj kaj 25 amikoj).

Vidu la liston de la donacintoj:

Patronoj (100 eŭroj): Benoît Philippe (Germanio), Werner Pfennig (Germanio), Syôzi Nobuyuki (Japanio), Geoffrey Greatrex (Kanado)

Amikoj (30 eŭroj): Angelos Tsirimokos (Belgio), Malcolm Jones (Britio), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Lydia Lindla (Estonio), Raita Pyhälä (Finnlando), Tuomo Grundström (Finnlando), Jean-Luc Tortel (Francio), Margarete Bastian (Germanio), Sophia Brandt (Germanio), Ulrich Brandenburg (Germanio), Reinhard Fössmeier (Germanio), Ingrid Gleitsmann (Germanio), Miguel Angel Bueno Avila (Hispanio), Carlos Spinola (Hispanio), Pedro Zurita (Hispanio), István Szabolcz (Hungario), Carlo Minnaja (Italio), Bobelarto (Kanado), Gražina Opulskienė (Litovio), István Ertl (Luksemburgio – trioble), Katalin Kováts (Nederlando), Marc van Oostendorp (Nederlando), Ilona Koutny (Pollando), Aleksandr Ĉernyĥ (Ruslando), Bo Sandelin (Svedio), Stefan Brodd (Svedio/Usono), Nicol Margot (Svislando), Gary Grady (Usono), Humphrey Tonkin (Usono), Ed Williger (Usono),

La Ondo de Esperanto jam la kvinan jaron aperas dumaniere: unue, kiel ĉiutage aktualigata novaĵretejo; due, kiel ampleksa trimonata bitgazeto en kiu aperas la plej gravaj tekstoj el la novaĵretejo kaj ankaŭ artikoloj, eseoj kaj beletraĵoj, verkitaj speciale por la gazeto.

Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere kaj senpage legebla de ĉiuj dezirantoj, la gazeton ricevas nur tiuj, kiuj abonas ĝin. Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 15 eŭroj
2. Amiko – 30 eŭroj
3. Patrono – 100 eŭroj

Pri la pagomanieroj legu ĉi tie: <https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Ĝis nun neniu esperantista asocio, instanco aŭ fondaĵo subtenis la solan ĉiutage renovigatan Esperantan novaĵretejon. Ĝia funkciado dependas nur de la helpemo de tiuj, kiuj abonas la ĉiusezonan gazeton *La Ondo de Esperanto*. Se vi ne abonas ĝin, sed deziras helpi la novaĵretejon, abonu ĝin aŭ abonigu via(j)n amiko(j)n por 2024.

Dankon pro via helpo!

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Eventoj



Dum la unuaj tri monatoj de la komenciĝinta jaro esperantistoj renkontiĝis ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en aliaj mondopartoj, interalie, sur la insulo Madagaskaro kaj en la montaro Himalajo.



TEJO-volontulo pri la 14a JES en Germanio

TEJO tradicie sendas volontulojn al la plej grandaj junularaj aranĝoj por reprezenti sin, do kompreneble al JES (Junulara Esperanto Semajno). Ĉar miaj karegaj kolegoj ankoraŭ ne plene komprenis, ke ĝi estas pli festa kaj karaokeumada ol konferenca, aŭ eble ĉar nur mi sufiĉe stultas por akcepti tutan semajnon de manko da dormo, mi estis la nura kandidato por ĝui la malavarecon de TEJO kaj diri jes al JES (bonvolu pardoni tiun ege tro facilan vortaranĝon). Eĉ eble ili antaŭvidis la nuligon de mia trajno al Berlino, pro kio mi maltrafis la interkonan vesperon kiu okazis sen nomŝildujoj ĉar mi respondecis pri kunporti ilin. “Repagitajn vojaĝumojn” ja anoncis la muzikalo *Petveturaj aventuroj* al volontuloj...

Ĉi-jare la nun malevitinda junulara renkontiĝo de Novjaro okazis ekde la 27a de decembro 2023 ĝis la 3a de januaro 2024 ĉe la gastigejo “Hirschluch” en Storkow, inter Berlino kaj Pollando. Partoprenis 186 homoj el 20 landoj. Danke al la aktiva, kuraĝa organizanta teamo de GEJ (Germana Esperanto Junularo) kaj al partoprenintoj JES disponigis riĉan koncertan programon, lingvokursojn por komencantoj kaj progresantoj, ekskursojn, saŭnon, artfajron kaj ŝakturniron. Pro interesa verdskolta iniciatemo, la partoprenintoj ĉiuj (se ili volis) havis koverton por ricevi skribitajn am-, aŭ almenaŭ ŝat-, mesaĝojn de la aliaj. Ties sukceso povas montri ke la hodiaŭaj junuloj ankoraŭ ŝategas verki kaj legi manskribitajn mesaĝojn. Ĝi ebligis kunporti memoraĵojn el la kongreso, kaj eventuale komuniki kun iu se oni ne rin trovis inter la 186 ĉeestintoj.

Kvankam ili klare bezonis dormon, kelkaj aŭdaculoj kiel mi aliĝis al neformala seminarieto pri lingva politiko de TEJO organizita de Michael Boris Mandirola. La celo estis cerbumi pri alireblaj prezentaĵoj de la pozicioj de TEJO pri lingvoj rilate al homaj rajtoj, la lingva problemo en internacia komunikado, la rolo kaj taŭgeco de Esperanto en tio (pozicioj legeblaj en ĉi tiu dokumento). Do eble lingvopolitikaj memoj atendas vin baldaŭ.

Tamen la evento montris ke nin atendas granda defio por la vintraj eventoj: la nombro de malsanuloj (inkluzive de KOVIM)! Verŝajne la problemo ne novas, sed nun ĝi ŝajnas pli serioza. Oni bone konscias ke malsanoj ne nur temas pri persona malkomforto dum kelkaj tagoj; ili fakte mortigas. Kion fari nun? Ĉu porti maskojn, amase testiĝi, provizi apartan dorm- kaj manĝĉambron por la malsanuloj? Ni ankaŭ ne povas ignori, ke pli frue reveni hejmen ege malfacilas pro la kosto de lastminutaj trajn- aŭ flugbiletoj... do ĉiuokaze ni devas plugastigi la malsanulojn ie en la kongreso, sed kiel? Multe da diskuto okazis pri tio, sed neniu perfekta solvo ekzistas.

La statistikoj ankaŭ montras ke progreso pri inkluziveco bezonatas, ĉar partoprenis 103 iĉoj kaj 60 inoj (+ aliaj kaj partoprenintoj kiuj ne indikis genron).

Cyril Schultz
TEJO-volontulo

Fonto: www.tejo.org



La oka Luminesk' sur nordmara insulo Norderney

Je la jarŝanĝo 2023/2024, la oka Luminesk' okazis sur la insulo Norderney kun ĉirkaŭ 50 partoprenantoj el 10 landoj. La tema programo enhavis multnombrajn kontribuojn pri diversaj temoj, kiel socipolitikaj (K. Breuning: "Ŝvaboj en Kartvelio"), natursciencoj (A. Wandel: "Astronomio" kaj C. Roether: "Sunhorloĝo"), geografia (U. Brandenburg: "Fora lando"), literatura kritiko (C. Oetter: "Judaj poetoj en la Tria Regno"), lingvistiko (F. Kruse: "Malaltgermana" kaj W. Blanke: "Knedloj") kaj transportpolitiko (G. Brandenburg: "Fervojoj kaj Ŝipoj" kaj D. Mühlemann: "Trafik-cirkuloj").

Antaŭĝoje al la 109a Universala Kongreso estis afrika vespero. La ekskursojn kaj la vesperan programon aranĝis U. Brandenburg. Pluraj prelegoj estis faritaj kiel parto de la Vintra Universitato AIS de A. Wandel.

Individuaj kontribuoj estis registritaj virtuale. C. Tytgat proponis lingvokurson. N. Janssen ofertis danckurson kaj manfaritaĵojn. E. Lies proponis ridan jogon. B. Brandenburg preparis interalie la orientfrisian abituron. Diversaj duontagaj ekskursoj kondukis al orientfrisaj kulturejoj kaj naturhistoriaj lokoj. La nederlanda duopo *Kajto* kontribuis koncerton kaj atelierojn. B. Brandenburg respondecis pri la administrado de partoprenantoj kaj kontribuis al pluraj programeroj.

Andreas Diemel



“Esperanto parolata”: La 20a NR en Wiesbaden

Neniu loko ŝajnas al ni pli adhera al la koncepto “Esperanto parolata” ol la 20a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden, Germanio, kiu okazis de la 27a de decembro 2023 ĝis la 3a de januaro 2024.

Sep tagoj, dum kiuj kunvenis ne francoj kun danoj, ne italoj kun nederlandanoj, ne germanoj kun belgoj – sed homoj kun homoj. La programo estis zorge preparita skemo, laŭ kiu la partoprenantoj povis elekti inter dekoj da prelegoj, kursoj, laboratorioj, ekskursoj – kaj simpla restado ĉe la “gufujo” por babilo kun geamikoj, ĉu malnovaj ĉu ĵus ekkonitaj.

La motoro de ĉio tio, nome Lu Wunsch-Rolshoven, enplektis en la aranĝon sian sintenon al Esperantujo, sian fidon al la arto memzorgi de la NR-partoprenantoj, sian kapablon alfronti la defion de dudekjara event-aranĝo per rideto kaj senhezita problemsolvemo. Aro da kompetentaj kaj fidindaj helpantoj donis al la pli ol 150 partoprenantoj el deko da landoj senriproĉan kaj vere ĝuidan (kaj ĝuitan!) renkontiĝon. Ĉeestis trideko da infanoj kaj junuloj, kunfestis paroj kaj unuopuloj, en aĝa gamo de unu ĝis pli ol okdek jaroj.

La programo estis diversa kiel kutime. Koncertis kun harpo Clarissa, juna kantistino el Italio, aperinta en Esperantujo dum la lastaj jaroj. Pupan teatraĵon *Herbe kun la ĉapelego* prezentis Christoph Frank. Lina kaj István Ertl surscene legis letero-interŝanĝon de internacia amparo, surbaze de vera historio el Esperantujo — emociveke. Fascinis la publikon, kiel jam plurfoje, la Scienca Mirkvizo de Bart Demeyere; interese, kion la scienco eltrovis dum la lastaj jaroj. Prezentiĝis ankaŭ koncerto-prelego de Ludger Schmeink pri la komponisto Claude Debussy kaj la rilatoj de liaj komponaĵoj kun poezio kaj pentrarto. La ĉeestantoj povis ankaŭ ĝui, kion TEJO kreis lastatempe en la kampo de muzikaloj. Kompletigis la muzikan oferton ĥoro kun Jesper Jacobsen kaj kantateliĝo kun Dieter Rooke, kiu instigis ankaŭ al himno-kantado. Krome okazis tradiciaj programeroj kiel la interkona vespero kun interŝanĝo de kunportitaj frandaĵoj por manĝi kaj trinki, la Silvestra festo kaj la internacia vespero.

Prelegoj kaj diskuttrondoj abundis kiel kutime. Preskaŭ ĉiutage Jesper Jacobsen gvidis debatojn pri temoj de la nuntempa mondo en la lumo de aktualaĵoj politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj mediaj.

La promenadoj kaj ekskursoj gvidis la partoprenantojn al parkoj, banejoj kaj pliaj belaĵoj de la urbo Wiesbaden kaj al proksimaj celoj, ekzemple al la bahaa templo en Hofheim-Langenhain kaj la najbara urbo Mainz.

Se vi serĉas signifon en la duvorto “Esperanto parolata” — trovu ĝin en la venonta 21a NR, fine de la nuna jaro!

Luigi Fraccaroli
Debora Rossetti
Lu Wunsch-Rolshoven

Novjara Esperanto-Kunveno 2024 en Tajvano

La Tajvana novjarfesta kunveno denove okazis en Pingtung. Dekoj da homoj el ok landoj partoprenis ĝin ĝoje kaj vigle. La interesa programo plenigis nian tagon, kaj la bona vetero kompletigis la sukceson de la kunveno en la kafejo *Wo Brunch*.

Reza el Irano, kiu gvidas la Esperanto-asocion en Tajvano, malfermis la kunvenon per mallonga bonveniga parolado kaj poste prezentis nian movadon en Tajvano kaj montris bildojn pri fremdaj esperantistoj kiuj vizitis Pingtung-on.

Sekvis serio da prezentadoj. Jerry el Usono, kiu laboras kiel pastro en Kaohsiung, instruis al ni la signolingvon de Esperanto. Poste Teddy el Indonezio, kiu laboras kiel programisto en Taoyuan, montris la rilaton inter la indonezia lingvo, lokaj lingvoj kaj indiĝenaj lingvoj de Tajvano. Li montris ankaŭ la skribsistemon de kelkaj indoneziaj lingvoj. Cheyenne el Usono, kiu laboras kiel profesoro en la universitato en Tajpeo, gvidis interesan ludon kiu uzas Esperantajn vortojn. Fabina, kiu venis el la urbo Xiamen en Ĉeftera Ĉinio, prezentis al ni la popularan ĉinan kanton *Ondo de Gulangyu*, kaj tiu kanto estis kantita en Esperanto.

Post la prezentoj oni malŝaltis la lampon kaj la posedanto de kafejo eliris el la kuirejo kun kuko en la mano, kaj la kunvenintoj kantis la kanton okaze de la naskiĝtago por Teddy. Post la kanto Teddy dankis ĉiujn kaj esprimis sian esperon, ke nia movado en Tajvano pliboniĝos kaj ke ĉiuj homoj estu pli sukcesaj en la nova jaro.

Fine de la kunveno, kelkaj iris kune por vespermanĝi en korea kradrostejo kaj interbabilis en la domo de Fabina. La Tajvana geesperantistaro estas plena de energio kaj bonkoreco. Kvankam multaj el la flujaj parolantoj en Tajvano estas fremduloj, ankaŭ lokanoj montras intereson pri lernado de nia lingvo.

Teddy Nee



Kristana Esperanto-Seminario en Malagasio: Harmonia, sukcesega, ripetinda

Malagasio estas unu el la plej malriĉaj landoj de la mondo. Tamen la Esperanto-movado tie viglas. En januaro, danke al subteno de UEA kaj ILEI, pastorino Miora Raveloharison organizis en eklezia klerigejo en la ĉefurbo Antananarivo instruistan seminarion kun 32 partoprenantoj. Du monatojn poste ŝi organizis en la sama loko Kristanan Esperanto-Seminarion, kun subteno de la germana sekcio de KELI.

Efektive ankaŭ tiu ĉi seminario fariĝis granda sukceso. Aliĝis kaj venis al ĝi 43 homoj – 42 malagasioj, plejparte gejunuloj, kaj, kiel la plej aĝa partoprenanto, mi el Germanio.

Ni komencis la seminarion ĵaŭde, la 7an de marto antaŭtagmeze per salutvortoj kaj meso. Posttagmeze mi prelegis, el vidpunkto de kristana esperantisto, pri la semina temo “Vizioj por pli bona mondo”. Sekvis sufiĉe vigla diskuto, kaj fine ni dividiĝis en laborgrupojn por plenumi diversajn taskojn. Kvankam en mia grupo ĉiuj krom mi estis komencantoj, kiuj lernis la lingvon nur de ĉ. unu jaro, ni sukcesis kompreni en Esperanto kaj plenumi ĉiujn taskojn. Ekzemple ĉiu grupano devis prezenti antaŭ la publiko unu ideon por kontraŭbatali malsaton.

Ni komune preĝis kaj kantis. Iujn kantojn pastorino Miora kaj mi speciale tradukis el la malagasa, dum aliajn mi venigis el Eŭropo. Ekzemple la hispana kanto



“Pescador de hombres” (“Fiŝkaptisto de homoj”, pri la kristaniĝo de Sankta Petro), kies pola versio “La barka” fariĝis la plej ŝatata kanto de Papo Johano Paŭlo II, trovis nun en Esperanta versio (“Krist’ ĉe marbordo ekstaris”) entuziasman akcepton en Malagasio.

Vendrede antaŭtagmeze ni ekskursis al la malnova reĝa palaco de Malagasio, kiu samtempe estis religia kultejo – agrabla, interesa kaj sufiĉe trankvila loko vizitata dum belega somerfina vetero en bela, amika atmosfero. Posttagmeze Miora prelegis pri la seminaria temo. Ŝi emfazis, ke havante Jesuon en nia koro, ni povas ami unu la alian kaj pludoni ĝojon kaj pacon. Poste la malagasaj sekcioj de KELI kaj IKUE, AME (Asocio de Malagasaj Evangelianoj) kaj MUKE (Malagasa Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj), elektis novajn estrarojn. Menciindas, ke ekster Malagasio KELI havas funkciantan landan sektion nur en Germanio, kaj IKUE eble nur en Italio. Preskaŭ tri kvaronoj de la seminarianoj estis romkatolikoj, kaj sekve mi tre bedaŭris, ke IKUE – tute male al KELI – obstine rifuzis iel ajn subteni la seminarion. Ni, kristanaj esperantistoj, devus konsideri, ke la estonteco de nia movado povus esti ĝuste en Afriko.

Precipe en la dua duono de la seminario ni multe dancis, kantis, kaj faris viglajn ludojn por lerni Esperanton. Sabate antaŭtagmeze ni fermis nian seminarion per adiaŭaj vortoj kaj meso; ni disiĝis post la tagmanĝo.

Iom surprizis kaj kortuŝis min, ke ĉiuj partoprenantoj donis ne nur al la etoso,



sed ankaŭ al la manĝoj kaj la dormĉambroj senescepte la notojn “bone” kaj – precipe al la manĝoj – “tre bone”. La seminariejo, kie plena pensio kostas malpli ol 15 eŭroj tage, montrigis ege taŭga por tia aranĝo. La manko de varma akvo en la ejo ne vere ĝenis min dum la ĉiam varma vetero.

Mi sentis min ege bonvena kaj utila en la seminario. Konstante mi sentis belegan harmonion kaj ĝuis profundajn interparolojn. La seminario helpis al multaj gejunuloj ŝategi Esperanton; iu knabino poste skribis al mi: “Kiam mi grandos, mi volas fariĝi instruistino de la lingvo Esperanto”. Pastorino Miora jam planas ripeti la aranĝon venontjare, kaj efektive mi jam planas reveni tiam. Eĉ temon por la venonta jaro ni jam havas: “Virinoj en la Biblio kaj en la nuntempa mondo”.

Ulrich Matthias

Foto: Fafah Rafanomezantsoa, Ulrich Matthias kaj Miora Raveloharison.



Alia mondo eblas: Esperanto en Monda Socia Forumo

La Monda Socia Forumo 2024, kiu okazis en Katmanduo de la 15a ĝis la 19a de februaro, kunigis aktivulojn el la tuta mondo sub la temo “Alia mondo eblas”. Katmanduo kun sia riĉa etna diverseco funkciis kiel vivoplena fono por la monda kunveno, kunigante voĉojn kontraŭ maljusteco kaj defendante pli justan mondon. Oni supozas, ke al la forumo venis aktivuloj, reprezentantaj 1252 organizojn en 92 landoj.

Malgraŭ la fakto, ke ĝi estis novnaskita, Himalaya Asocio, kun subteno de la loka NRO Jcycn por logistikhelpo, faris signifan impreson per originala stando kaj fulmkoncerto pri paco, danke al financa subteno de UEA kaj grupo de privatuloj. Kunigo de 25 pacvolontuloj, la asocio aktive partoprenis en marŝo tra la urbocentro en la unua tago, allogante atenton de miloj da observantoj dum almenaŭ tri horoj.

Partoprenantoj kaj volontuloj aperis dum kvin tagoj kiel multkultura ekspozicio, kreskigante bonajn interkonektojn kaj kontaktojn kun homoj el diversaj partoj de la mondo.

Esperanto ŝajnis nova kaj nekonata lingvo por la vizitantoj de sudazia origino, precipe por nepalanoj, dum kelkaj eŭropaj kaj amerikaj vizitantoj jam aŭdis pri la lingvo. Estis altaj atendoj, precipe de junularo kaj gepatroj, koncerne trejnadon en la kampo de paco kaj homaj rajtoj, kie Esperanto povus servi kiel unu el la iloj. Por plifortigi la kreskon de la lingvo en Nepalo, estis rekomendite evoluigi agadodirektitajn projektojn por junularo, fokusitajn al paco kaj homaj rajtoj. Inter la disdonitaj materialoj, la libreto *Esperanto per Rekta Metodo* montriĝis la plej postulata, indikante grandan intereson lerni la lingvon.

La Esperanto-stando, ornamita per presitaj materialoj kaj ciferecaj ekranetoj allogis atenton de almenaŭ 800 homoj, el kiuj 436 montris specifan interesigon pri Esperanto kaj prenis rilatajn materialojn dum la forumo.

Rekomendoj

Strategiaj Iniciatoj: Por antaŭenigi la celojn de Esperanto en Nepalo, oni devus evoluigi agadodirektitajn projektojn, aparte tiujn rilatajn al paco kaj homaj rajtoj, celante la junularon.

Daŭra Kontakto: Donita la pozitiva respondo, daŭrigotaj klopodoj konsciigi pri Esperanto, precipe per informado tra amaskomunikiloj, povus pli plifortigi ĝian videblecon kaj komprenon.

Fine: Monda Socia Forumo 2024 en Katmanduo provizis platformon por signifa monda dialogo, kun Himalaya Asocio kaj UEA, farante gravajn kontribuojn, starigante la scenejon por daŭra kunlaboro.

Prakash Khadka
Himalaya Asocio

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Komenciĝis preparado al la Esperanto-Tago. La supra afiŝo jam estas preta en la versioj albana, angla, ĉina, dana, Esperanta, eŭska, franca, hispana, irlanda, itala, nederlanda, norvega, portugala, svahila kaj sveda. Proponu tradukon al via gepatra lingvo kaj sendu ĝin al unesperante@gmail.com.



Esperanto-Poŝtkruciĝo – sep jaroj da amikeco

Antaŭ sep jaroj, la 25an de marto 2017 estis lanĉita Esperanto-Poŝtkruciĝo (EoPK) – projekto de MASI pri interŝanĝo de bildkartoj en Esperanto inter homoj el diversaj mondopartoj. Penante superi grandajn teknikajn kaj geopolitikajn malfacilaĵojn, perdante dekojn da membroj kaj akirante unuopulojn, ĉi tiu modesta amikiga agado plu vivas, aldonante sian guteton al la internacia komunikiĝo kaj plia interkompreno inter la homoj de “la mond’ eterne militanta”.

Ĉiujn teknikajn ŝarĝojn dum la du lastaj jaroj portas sur siaj ŝultroj la MASlanino el Germanio Julia Mul (Traum). Ŝi prizorgas la EoPK-paĝaron en FB kaj la ĉiumonatan dissendon de la adresoj al la EoPK-membroj, iniciatas vigligon de la agado kaj dissendas salutajn bildkartojn al ĉiuj novaj membroj. Sen la sindona laboremo kaj disciplinemo de Julia la afero nun ne povus ekzisti – kaj ni, la dudeko da sepjaraj ŝatantoj de tiu ĉi agado, multe al ŝi dankas.

Nun nian Poŝtkruciĝon partoprenas pli ol 80 homoj el ĉirkaŭ 25 landoj. Inter ili en tiu ĉi jaro aperis ankaŭ 10-12-jaraj infanoj el Rusio, kiuj multe ĝojas pro ĉiu bildkarto kaj – jes – bezonas scii, ke esperantistoj ekzistas ankaŭ en aliaj landoj kaj ke ili estas amikemaj.

Konatiĝu kun EoPK en la retejo <https://bildkarto.wixsite.com/bildkarto>, aŭ aliĝu ĉe <https://mallonge.net/eopk>.

Irina Gonĉarova

Arkivo



Ampleksiĝas la blogo “Kronikisto”. Nun en ĝi estas 22 tekstoj kaj 376 ilustraĵoj. Laste aperis artikolo pri la 18a Renkontiĝo Esperantista Volga-Urala kiu okazis en Tjumeno ekde la 29a de aprilo ĝis la 2a de majo 1979. La supra foto montras eron el la laborprogramo: du lernantinoj, Marina Itpekova (staranta) kaj Svetlana Varova (sidanta), rakontas pri instruado de Esperanto en la Tjumena junulara klubo “Dzerĵinec”. Apude sidas du Vladimiroj: Opletajev kaj Izosimov. (Foto de Eŭgeno Tartyŝev)

Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2024

1. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Gerrit Berveling** (1944-1972-), nederlanda instruisto, remonstranta pastoro kaj esperantisto; prezidanto de la landa asocio Esperanto Nederland (2009-12), membro de la Akademio de Esperanto (1989-), prezidanto de EVA (1993-2003), la lasta redaktoro de *Fonto* (1993-2006); unu el plej fekundaj Esperanto-aŭtoroj (pli ol 80 libroj originalaj kaj tradukitaj); laŭreato de la OSIEK-premio pro la kvinvoluma *Antologio Latina* (2003), laŭreato de la diplomo de UEA pro elstara arta agado (2013).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 35-36).

2. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Nicolino Rossi** (1939-1962-), itala hotelsekretario kaj esperantisto kun sanmarina civitaneco; membro de la literatura rondo “La Patrolo” kaj redakciano de *Literatura Foiro*, plurfoja laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA; aŭtoro de la poemaro *Sur la vivopado* (1980), tradukinto de pluraj verkoj el la itala (I. Calvino, G. Leopardi, G. Pascoli, G. Ungaretti k. a.) en Esperanton kaj de *La infana raso* de W. Auld el Esperanto en la italan.

8. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Raymond Schwartz** (1894-1909-1973), franca bankisto kaj esperantisto, animanto de la kabaredoj *La Verda Kato*, *La Bolanta Kaldrono* kaj *La Tri Koboldoj* en Parizo; aŭtoro de *Verdkata testamento* (1926), *Prozo ridetanta* (1928), *Anni kaj Montmartre* (1930), *Ne kiel Meier!* (1930), *La stranga butikio* (1931), *La ĝoja podio* (1949), *Kiel akvo de l' rivero* (1963), *Vole ... novele* (1971), ... *kun siaspeca spico!* (1971) k. a., redaktoro de la satira gazeto *La Pirato* (1933-35).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 249-251).

8. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Christer Kiselman** (1939-1980-), sveda matematikisto, membro de Reĝa Sveda Scienca Akademio kaj esperantisto; membro (1989-2015), vicprezidanto (1998-2004) kaj prezidanto (2013-15) de la Akademio de Esperanto, dekano de la sekcio por strukturaj sciencoj de AIS (2017-19), vicprezidanto de ISAE (1986-93); ĝenerala sekretario de Akademio Comenius (1986-); aŭtoro de studoj, artikoloj kaj recenzoj pri fakaj kaj esperantologiaj temoj; fondinto kaj redaktoro de *Esperantologio / Esperanto Studies* (1999-2018), rektoro de IKU en du UKoj (2003, 2011); laŭreato de la diplomo de UEA pro elstara agado (2014).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 156-157).

9. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Violin Oljanov** (1919-1933-1998), bulgara ĵurnalisto, filologo kaj esperantisto; sekretario kaj vicprezidanto de BEA (1955-64),

prezidanto de IUEF (1963-94), redaktoro de *Bulgara Esperantisto* (1957-64), *Filologo* (1974-91) kaj *Paco* (1976-89), aŭtoro de kelkaj Esperanto-libroj kaj pli ol mil artikoloj pri/en Esperanto, membro (1986-98) kaj vicprezidanto (1989-95) de la Akademio de Esperanto.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 219-220).

10. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Reto Mario Rossetti** (1909-1928-1994), svis-devena brita instruisto kaj esperantisto; aŭtoro de *Kvaropo* (kun W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis, 1952), *El la maniko* (1955), *Pinta krajono* (1959), *Spegulo de Esperantaj stiloj* (1976), *Arto kaj naturo* (1989); tradukinto de verkoj de Ŝekspiro, R. Burns k. a.; kunredaktoro de *Angla Antologio* (kun W. Auld, 1957), *33 rakontoj* (kun F. Szilágyi, 1964), *Trezoro* (kun H. Vatré, 1989); membro de la Akademio de Esperanto (1968-92); honora membro de UEA (1982).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 243-244).

10. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Adolf Burkhardt** (1929-1946-2004), germana luterana pastoro kaj esperantisto; prezidanto de KELI (1961-75, 1981-2000), tradukinto de multaj kristanaj kantoj, kunkompilinto de la ekumena preĝ- kaj kant-libro *Adoru* (2001), iniciatinto kaj la unua direktoro de Germana Esperanto-Biblioteko (1989-2004); laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de FAME (2002), honora membro de UEA (2003).


- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 50-51).

28. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Gurgen Sevak** (Grigorjan, 1904-1921-1981), armena sovetunia filologo kaj esperantisto; prezidanto de Armenia Esperantista Unio (de 1925), sekretario de la Armenia Komitato de SEU, prezidanto de la Esperanto-komisiono ĉe la Armena Societo por Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj (1965-79) kaj de Armenia Filio de ASE (1979-81), aŭtoro de Esperanto-lernolibro por armenoj (1930), membro de la Akademio de Esperanto (1964-81).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 257-258).

28. Antaŭ 20 jaroj mortis **Egidius Wensing** (1913-1930-2004), nederlanda entreprenisto (direktoro de unu el la tri sekcioj de Philips), kunfondinto kaj prezidanto de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio, tradukinto de kelkaj reklamaj broŝuroj de Philips, vicprezidanto de UEA (1962-72, 1974-77), la unua prezidanto de Institucio Hodler '68 (1968-72).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 299-300).



Tjumeno, 1979: Partoprenantoj de REVU-18

Antaŭ 45 jaroj: Ne nur pri Esperanto

Ampleksiĝas la blogo “Kronikisto”, kiun la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* kreis en aŭgusto 2021 por publikigi (foto)rememorojn pri sia esperantista vivo. Lastatempe en ĝi aperis tri novaj ilustritaj artikoloj. Kiel kutime, en ĉi tiuj rememoroj temas ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri eventoj en la mondo kaj en Sovetunio, ankaŭ pri la vivo de la aŭtoro mem.

1. REVU-17 en Kujbyŝev post la eksploda atenco

La 17a Renkontiĝo Esperantista Volga-Urala (REVU-17) okazis la 6-8an de novembro 1978 en la apudvolga urbo Kujbyŝev (Samara), kie du tagojn antaŭ la malfermo de REVU-17 oni provis (kun parta sukceso) eksplodigi la monumenton de la marŝalo D. Ustinov, unu el la plej betonkapaj partiaj kaj ŝtataj Sovetuniaj gvidantoj de tiu tempo. Malgraŭ ĉi tiu evento, la renkontiĝo okazis glate kun pli ol 70 partoprenantoj.

Ĉi tiun artikolon garnas 24 ilustraĵoj, inkluzive de kelkaj skanitaj gazetaj artikoloj, interalie, en la Tjumena universitata ĵurnalo *Leninec*, kiu informis pri tio, ke en Tobolsko(!) renkontiĝis kvin “esperantoj” el 15 urboj. (La redaktorino devis poste aperigi pli ampleksan artikolon por kompensi la fuŝon).

Ĉar ĉi tiu artikolo fermis la priskribadon de la 1978a jaro, en ĝia fino A. Korĵenkov resumas la ĉefajn eventojn de tiu jaro en la sferoj de la politiko, sporto, muziko kaj kino, sen forgesi pri si mem – 20-jara studento, daŭriganta lerni Esperanton.

Legu la artikolon ĉe <https://kronikisto.livejournal.com/5159.html>

2. Lazura Tajgo dum la rekorda frosto

Dum la lastaj tagoj de la 1978a jaro Ruslandon kovris ekstrema frosto, kiu kulminis je la Novjarfesta nokto, kiam en Tjumeno oni registris rekorde malvarman temperaturon. Sed eĉ la rekorda frostego (-53°C) ne malhelpis al 18 esperantistoj okazigi kaj partopreni en Tjumeno la novjarfestan renkontiĝon Lazura Tajgo 3.

Legu prian artikolon, kiun garnas 11 ilustraĵoj, ĉe <https://kronikisto.livejournal.com/5664.html>.

3. REVU-18 en Tjumeno antaŭ inundo

REVU-18 okazis en Tjumeno ekde la 29a de aprilo ĝis la 2a de majo 1979. La ampleksan artikolon pri ĝi en “Kronikisto” garnas 33 ilustraĵoj: fotoj kaj skanaĵoj. La fotoj montras konatajn tiutempajn aktivulojn: Vladimir Izosimov, Boris Kolker, Tatjana Koptjagina, Aleksander Korĵenkov, Diljara Mаметova (Gadirova), Vladimir Opletajev, Aleksandr Ŝarov, Nadeĵda Ŝeveljova (Panova), Timofej Ŝuvajev, Jevgenij Tartyŝev, Viktor Zaĥarov k. a.

El la 53 partoprenantoj en la grupfoto estas 38 personoj; 26 el ili estas identigitaj, 12 restas nekonataj – se vi konas iun el la neidentigitaj, bonvolu lasi komenton.

La artikolo enhavas ankaŭ fonajn informojn pri tiutempa inundego en Tjumeno (la akvo en la rivero Tura altiĝis je ok metroj), ruiniĝo de ponto en Tjumeno, biologi-armila katastrofo en Sverdlovsko.

Legu ĝin ĉe <https://kronikisto.livejournal.com/6348.html>

Nun en “Kronikisto” estas 22 tekstoj kaj 376 ilustraĵoj. Pliaj baldaŭ aperos.

Legu, spektu kaj komentu la publikaĵojn en “Kronikisto” ĉe <https://kronikisto.livejournal.com>.

AIKO

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



En la naŭa parto de nia projekto “Rusa Novelaro 2” estas prezentataj ses rakontoj de Aleksandr Grin (1880-1932), kies eventoj okazas en la fikcia regiono, kiun post la forpaso de la verkisto oni nomis Grinlando.

En Grinlando ie...

“Bonan vesperon, geamikoj! Ĉu vi ne enuas sur la malluma vojo? Mi rapidas, mi kuras...” – ĉi tiuj simplaj vortoj, la lastaj en la romano *Kuranta sur ondoj* de Aleksandr Grin, ofte resonas en mia menso, kiam mi promenas preter la skulptaĵo de Frezi Grant en Zelenogradsk (Cranz), ĉemara urbeto, en kiu estas nia “ripozloĝejo”...

Mi memoras, ke multaj miaj samklasanoj, precipe la samklasanoj, ŝategis la verkojn de Grin, kvankam oni eldonis ilin avare (la fama sesvolumaĵo, eldonita en 1965, havis magran eldonkvanton 500 mil ekzempleroj por pli ol cent milionoj da latentaj legantoj.). En bibliotekoj kreiĝis legovicoj por Grinaj libroj, kiuj post cento da tralegoj aspektis tiel mizere, ke la bibliotekestroj devis malregistri ilin, kaj tiam la plej feliĉa en la mondo taksis sin tiu junul(in)o, kies patr(in)o alportis hejmen el la biblioteko ĉi tiun “mal-ekzistan” trivitan volumon.

Aleksandr Grinevskij (Александр Степанович Гриневский) naskiĝis la 11an (Gregorie: la 23an) de aŭgusto 1880 en la urbo Slobodskoj, proksime al la gubernia ĉefurbo Vjatka (nun: Kirov). Lia patro Stefan Hryniewski, partopreninto de la pola insurekcio de la 1863a jaro, post kvinjara ekzilo en Tomaska gubernio ekloĝis en Slobodskoj kaj en 1873 edziĝis kun la 16-jara flegistino Anna Lepkova. En 1889 Aleksandro eklernis en la “reala lernejo” de Vjatka, sed en 1892 li estis eksigita pro satira poemo, kiun li verkis pri siaj instruistoj, kaj li daŭrigis siajn studojn en malpli prestiĝa lernejo, kie la samklasanoj donis al li la kromnomon Grin. En 1895, baldaŭ post la morto de la patrino, la patro (jam ricevinta Ruslandan nobelecon) reedziĝis, sed pro la malbonaj rilatoj kun la duonpatrino la 15-jara Aleksandro ekloĝis aparte, multe legante kaj versante.

En 1896 li venis al Odeso kaj dum kelka tempo estis matroso en la Nigra Maro, poste manlaboristo en Bakuo, ministro en Uralo, riverŝipisto en Kamo kaj Volgo ktp, kun interaj revenoj al Vjatka, armea servado, dizerto kaj fuĝo, partopreno en la revolucia agado, kelkaj arestoj, du jaroj en prizono, du ekziloj, edziĝo en ekzilo kun Vera Abramova kaj nelonga geedza vivo, publikigitaj verkoj (ekde 1906), distanciĝo de la revoluciuloj, diboĉoj kaj kartludoj en Peterburgo, fuĝo al Finnlando pro verkoj kontraŭmilitaj kaj kontraŭcaraj (1916), seniluziiĝo pri la revolucio kaj nova aresto (1918), mallonga geedzeco kun Maria Gensiorskaja (1918-19), nelonga frontdeĵoro, tifo, edziĝo kun Nina Mironova (1921), bonaj honorarioj kaj fine, en aŭtuno 1924 – forveturo el Leningrado al la Krimea urbo Feodosija, kaj fine al Saryj Krym.



Komence Grin verkis prozaĵojn realismajn, sed jam en lia dua novelaro (1910) estis kelkaj prozaĵoj kun elementoj de romantiko, simbolismo, mistiko, fantasto, psikologio, burlesko – ĉio en neidentigebla loko – en Grinlando ie – kaj kun sentebla strebo al belo kaj bono, eĉ en ekstrema situacio, kun konfliktoj inter faktoj kaj fantazioj, amo kaj abomeno, revoj kaj racio, devoj kaj libero, etiko kaj estetiko...

Ni legu, ekzemple, lian rakonton *La parolema koboldo*, kiu aperis en 1923, kiam Grin estis verkanta sian unuan romanon *La mondo brilanta*.

Feliĉa paro. Ŝi “provis per siaj manoj kapti fiŝojn en la rivereto, frapis la grandan ŝtonon ĉe la vojkruciĝo, aŭskultante, kiel ĝi sonoras, longe mallaŭtiĝante, kaj ridis, vidante sur la muro flavan lummakulon de suno”, kaj Filĉjo laboris en kontoro.

Ekdormante, ŝi parolis: “Filĉjo, kiu flustras sur la arbopintoj? Kiu paŝas sur la tegmento? Kies vizaĝon mi vidas apud vi en la rivereto?” Alarmite li respondis, rigardante al ŝiaj duonfermitaj okuloj: “Korniko paŝas sur la tegmento, ŝtonoj brilas en la rivereto, – dormu kaj ne promenu nudpiede”.

Poste li sidiĝis al la tablo por fini la aktualan raporton, poste lavis sin, pretigis brullignon por la mateno kaj enlitiĝis, tuj ekdormante kaj poste ĉiam forgesante ĉion viditan en la sonĝo. Sed li neniam frapis la kantantan ŝtonon ĉe la vojkruciĝo, kie feinoj teksas mirindajn tapiŝojn el polvo kaj lunradioj.

Aperis Ralfo, edza amiko, kiu ankaŭ havis la talenton aŭdi la ŝtonan muzikon.

La ŝtono delonge silentiĝis, sed ili plu rigardis, ridetante senvorte, sene; poste li etendis sian manon, kaj ŝi lante etendis la sian, kaj la manoj kunigis ilin. Li prenis ŝian kapon – delikate, tiel delikate, ke li timis eĉ spiri, kaj kisis ŝiajn lipojn. Ŝiaj okuloj fermiĝis.

Laŭ la romantika kliŝo la amtriangulo devintus finiĝi per fuĝo de Anjo kaj Ralfo, por longe vivi kaj morti en la sama tago, sed ne. Ralfo ne deziras rompi la familian idilion de sia amiko kaj ties edzino. Li vanuas por ĉiam, Anjo ekmalsanas kaj mortas, kaj Filĉjo propravole sekvas ŝin. Tiun malnodiĝon ne komprenas la koboldo...

Grin ne havis antaŭulojn (kelkaj serĉas liajn radikojn ĉe Poe kaj Hoffmann) kaj ne postlasis posteulojn, lia voĉo restis unika en la rusa literaturo. Kompreneble, lia verkado, tre fora de “sorealismo”, ne povis esti longe tolerata. Venis amaso da kritiko, akuzoj kaj kalumnio (“ideologia malamiko”, “batalema reakciulo”, “lakeo de imperiismo” ktp); eldonejoj ĉesis presigi liajn librojn, kaj fine la familio de Grin falis en mizeron rande de malsato.

Grin mortis la 8an de julio 1932, kaj por pli ol dudeko da jaroj li estis preskaŭ forgesita, kaj publike rememorata nur kiel “predikanto de kosmopolitismo”, ekrevenis nur dum la poststalina “degelo”. Kaj en la 1960aj li fine trovis amasan legantaron.

Danke al Jurij Finkel jam aperis tradukoj de kvin libroj de Grin: *Skarlataj veloj* (1923), *La mondo brilanta* (1923), *La ora ĉeno* (1925), *Kuranta sur ondoj* (1928), *La vojo nenien* (1930). Nun ni proponas al vi ses pliajn rakontojn de Grin, esperante ke vi komforte fartos en Grinlando.

Aleksander Korĵenkov

Aleksandr Grin

LA PILORIO

I

Kiam la loĝantoj de la kolonio Kantervilo vagis tra marĉoj, elradikigante arbostum-pojn, sur kies surfaco povus libere sidi ses personoj svingante siajn piedojn, kiam ili okupiĝis pri satiĝo per krudaj manĝaĵoj, pri bataloj kontraŭ uloj kiuj trampis tra la regiono, kaj pri enbatado de fostoj por la fundamentoj de la estontaj nestoj, – eĉ plej rigoraj gardantoj de la moralo povus kulpigi ilin eble nur pri ilia inklino al tro energiaj esprimoj,

Kiam la domoj estis konstruitaj, la kampoj plugitaj, kiam estis pendigitaj ŝildoj kun skribaĵoj “Lernejo”, “Hotelo”, “Prizono” kaj similaj, kaj la vivo ekfluis tiel enue kaj utile, kiel akvo en la drentubo, – tiam komenciĝis deliktoj. La eraon de deliktoj malfermis la klasike avara Glasin, kiu lude malgajnis al la disipema bonvivulo Petarg ĉion, kion li havis: la domon, la ĉevalojn, la vestaĵojn, la agrikulturajn maŝinojn, – kaj konservis nur siajn lavendaĵojn.

Poste okazis ŝteloj, falsado de testamento, starigo de barikado ĉe vojkruciĝo, kiam triopo da frenezuloj defendis la rajtojn por sia tereno kun fusiloj en la manoj; unu el ili, mortigita, estis levita kun cigaro forte kunpremita inter la dentoj. Virino fuĝis de sia edzo; al alia edzo, havanta ĉarman vivkunulino kaj du etajn infanojn, trovinte lian adreson venis el la fora okcidento ploranta, riĉe vestita virino kun belegaj novaj vojaĝsako kaj rufaj haroj. La lasta okazaĵo, kiu indignigis la larĝostajn virinojn kaj barbajn virojn de Kantervilo, kiuj, cetere, dum la okmonata vivo en la koloniaj tendoj spertis ĉiujn birdonestajn plezurojn de la kruda amindumado, estis fia kaj maldigna por la deca homo, forkapto de la ĉarma junulino Dezi Krok. Ŝi estis tre linda kaj kvieta. Ĉiu, kiu longe rigardis al ŝi, komencis senti sin tiel, kvazaŭ lian tutan korpon ĉirkaŭligus tremetanta hela araneaĵo. Dezi havis multajn adorantojn, sed ŝi estis ŝtele forkaptita de Goan Gnor vespere, kiam en la polva perspektivo de la strato, lumigita de la subiranta suno, estis malfacile distingi: ĉu interbatalas la bovoj revenantaj post la trinkado, ĉu iu surseligas kaptitino, premante ŝian buŝon

per la mano. Cetere, Goan ĉiam estis ĝentila, kvankam li loĝis sola, kio, kiel estas konate, inklinigas al insolento. Kaj krome, ja neniu atendis tiel frenezan agon de ĉi tiu homo.

Oni sciis kun plena certeco, ke unu semajnon antaŭ tiu okazaĵo en iu balo Goan longe kaj mallaŭte interparolis kun la junulino. Tiuj, kiuj observis ilin, vidis, ke la junulo estis staranta kun kompatinda vizaĝo, pala kaj perturbita. “Mi amas neniun, Goan, kredu min”, – la junulino diris. La virino, kiu sukcesis aŭdi ĉi vortojn, dum tri tagoj estis eksterordinare feliĉa: ŝi rerakontis ĉi tiun frazon kun diversaj intonacioj kaj komentoj. La ĉevalo de Goan, kuregante ĉe la arbara rando, mispaŝis en akvo-plenan kavon kaj rompis sian kruron; la kaptinto estis kaptita ekzakte unu horon post sia krimo.

Amaso da ĉevalistoj, kunveninta tie, kie la ĉevalo falis, stariĝis tiel dense, ke oni povis distingi nenion en la furioza tumulto de la brakoj kaj dorsoj. Fine la homa cirklo disfalis, la svenintan junulinon oni portis al arbustoj. La fratoj, patro kaj onklo de Dezi dum kelka tempo silente draŝis Goanon, premitan de la falinta ĉevalo, poste, laciĝinte kaj ŝvitinte, ili flankeniĝis kun la okuloj brilantaj, kaj sur la tero stariĝis figuro de disbatita homo, kraĉanta densan sangon. Grandaj ekimozoj kovris la vizaĝon de Goan, li aspektis mizere kaj terure, li balanciĝis kaj raŭke parolis iujn nekompreneblajn vortojn.

La neperfekta justico de ĉi tiu sovaĝa regiono, ne havante ĉi-okaze kaŭzon por mortigi Goanon, devigis lin respondecigi pro la peza ofendo de la familio Krok kaj de la junulino. Post longa bruado kaj disputado en la grundon antaŭ la hotelo oni enbatis lignan foston kaj alligis al ĝi Goanon, kunliginte liajn manojn en la malantaŭa parto de l' fosto. En ĉi tiu stato li estos staranta dum dudek kvar horoj, kaj poste li estos liberigita kaj rajtos sen plia puno fortreni sin ien ajn laŭ sia propra deziro.

Goan permesis, ke ili traktu lin laŭ la ordo de ĉi tiu ceremonio, moviĝante kiel venenita muŝo. Li silentis. La Kantervilaj aktivuloj kaj la ceteraj gapantoj, foririnte je konsiderinda distanco, ĝue spektis la rezulton de sia laboro kaj iom post iom disiris al siaj hejmoj,

Krepuskiĝis. Goan, lekante siajn frakasitajn lipojn, gluiĝintajn al la dentoj, estis pripensanta planon de la venĝo. Ĉio forbrulis en lia animo, li sentis nek honton, nek furiozon, li nur penis rememori, kiuj kaj kiel batis lin, kies parolado estis la plej minaca, kies voĉo estis la plej alta. Tio postulis multe da forto, kaj Goan baldaŭ laciĝis. Tiam li ekpensis pri tio, ke li neniam revidos ŝin. Li rememoris la dolĉan pezon de ŝia ekstreminta korpo, la rapidan batadon de ŝia koro, kiu dum kelkaj feliĉaj minutoj batadis sur lia brusto, la kapon klinitan malantaŭen kaj sian solan kison al la loko, kie sur ŝia brusto malfiksiĝis butono. Kaj li ekmuĝis pro la nesatigebla sopiro, streĉis siajn manojn; la ŝnuroj bruligis la haŭton de la artikoj. Antaŭ li estis ankoraŭ nokto kaj tago!

Goan staris, apogante sin jen sur unu piedo, jen sur la alia. Fojfoje li penis konvinki



sin, ke ĉio ĉi estas sonĝo, retroklinis la kapon, sed frapinte per sia nuko la foston, disbatis la iluzion. Jen flanke eksonis ŝtelirantaj paŝoj, ĉesis antaŭ Goan, kaj malrapide silentiĝis ĉe la vojkruciĝo. Malaperis la lumoj post la fenestroj, malklara silueto, ofte haltante proksimiĝis al Goan, kaj la kondamnito subite ekflamis, en la mallumo li ruĝiĝis ĝis la haroradikoj, sango plenigis liajn tempiajn vejnojn, kaj tamburece ofte ekbatis. Surdiga honto inundis la menson de Goan; li ekĝemis, fermis la okulojn kaj tuj malfermis ilin. La trista vizaĝo de Dezi kun larĝe malfermitaj okuloj haltis tre proksime antaŭ li, sed li ne povis etendi manon por peti ŝin pri indulgo.

– Ankaŭ vi... por vidi, – Goan softe

diris, – foriru, pardonu!

– Mi ja tuj foriros, – la junulino rapide flustris, – sed vi ne defendis vin, kial vi permesis ĉion ĉi?

– Aĥ! – li diris. – Kompataj vortoj; sed jam malfruas, Dezi. Vi turmentas min, sed mi amas vin. Foriru, ne, ne foriru... aŭ foriru; verŝajne, tio estos la plej bona.

– Mi tre kompatas vin. – Ŝi etendis sian manon, karesis la taŭzitajn harojn de Goan per rapida patrineca movo. – Ho, por kio, ne ploru. Vi... sed ne, mi foriros, oni povos ekvidi.

Ŝi repaŝis en la mallumon, kaj estis ne plu aŭdebla. Tremerante kaj ridetante, Goan glutis la grandajn salajn gutojn, falantajn el la senmovaj okuloj; pro ili estis varme al la vangoj kaj al la animo.

En la aero fajfis ŝtono, ĝi frapis la foston, rikoĉete tuŝis la orelon de Goan kaj falis al la piedoj de la kaptinto.

– Por vi, Dezi, – Goan diris, – nur por vi!

II

Matene, kiam la strata paŝado malvigliĝis, ĉar multaj deziris frumatene rigardi la rompinton de la socia trankvilo, oni malligis Goanon. Areto da afekte rikanantaj junaj viroj venis al la fosto de malantaŭe, kie estis la dorso de la ligito. Unu el la fratoj de Dezi, alta kaj akradenta atleto, distranĉis la ŝnuron per tranĉilo.

– Oni ordonis liberigi vin, – li balbutis, tusante, – do, atentu... ne vagaĉu en nia regiono.

Goan falis, apoginte siajn manojn sur la tero, ekstaris kaj, ŝanceliĝante dekstren kaj maldekstren, kvazaŭ irante sur ŝipa ferdeko dum ŝtormo, direktiĝis al sia hejmo. La amaso konscie disiĝis por doni al li la vojon.

Post unu horo sur la pordo de lia negranda domo pendis seruro. La fenestroj fermitaj per najlitaj lignaj tabuloj, hufaj spuroj ĉe la barilo, silentaj muroj – ĉio atestis, ke la deziro de la kolonio estis plenumita. Oni vidis, kiel Goan sur sia dua ĉevalo, blanka kun rufaj grupo kaj vosto, sen retrorigardi, rajdis post la kortoj al la prifalĉita herbokampo de la familio Krok. Poste komenciĝis arbora pado, vojo por bestoj kaj ĉasistoj.

Goan rajdis malrapide kun netolerebla deziro returni la ĉevalon kaj almenaŭ unu plian fojon rigardi la konatan fenestron de Dezi. Streĉante la kondukilojn, li estis pene levanta sian ŝvelintan manon. Li haltigis sian ĉevalon ĉe rojo kaj rigardis al la brilanta akvotorento; tie, sube, li renkontis la rigardon de ŝvelinta malhela vizaĝo. Elekti lokon por loĝi ŝajnis al li bagatela tasko – ja la tero estas granda.

Ĉe la vojturno al la montaro, kie post la blua fora densejo estis vojo al granda havenurbo, Goan, aŭdinte malantaŭe neklaran bruon, returnis la kapon, plu veturante kaj morne pensante pri la estonteco. Frapado de hufoj klare eksonis en la arbora bruo. Goan haltis kaj lin, sufokiĝante atingis Dezi.

La grandega, konsterna perplekseco de la Goana vizaĝo malligis ŝian langon. Konfuzite, ŝi elaŭskultis ĉiujn liajn eksklamaciojn. Li pensis, ke li komprenas la situacion, sed li timis kredi sin. Alrajdinte pli proksime al li, Dezi diris:

– Goan, kunprenu min. Mi ne plu povos vivi ĉi tie. Ĉiuj min ronĝas, lanĉis la klaĉon, ke mi estis via komplico, kaj eĉ ke ni havas infanon, kiun ni kaŝis ie.

Goan silentis. La ĉevalo, sur kiu la junulino sidis, ŝajnis al li gisita el matena lumo.

– La patro ofendis min, – Dezi daŭrigis. – Li parolas, ke tio estis nur komedio, kaj ke mi estas pekulino. Sed vi scias, ke tio malveras. Kaj vi ne devas denove kapti min. Mi elportis eksplodon de malico kaj moko.

– Kara, – Goan diris, ridetante per la tuta larĝo de sia frakasita vizaĝo, – nun la viroj persekutus vin pro tio, ke ne ili provis konkeri vin... kaj la virinoj – pro tio, ke oni preferis vin. La homoj abomenas amon. Ne proksimiĝu al mi, Dezi: mi ĵuras, ke mi perdos la memregadon kaj komencos kisadi vin. Pardonu min!

Sed baldaŭ iliaj kapoj interproksimiĝis, kaj du amoj, unu naskiĝanta, kaj la alia – delonge ekflaminta kiel pasia incendio, kuniĝis, kiel arbora rojo kaj granda rivero.

Ili longe vivis kaj mortis en la sama tago¹.

Tradukis **Aleksander Korĵenkov**

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La pilgrimado al Bjalistoko

de Laimundas Abromas



- Mi iros al Bjalistoko, mia karulino, – mi diris milde al mia edzino. – Vi ne nervoziĝu.
- Kion vi perdis tie? – ekinteresiĝis mia edzino. – Nur vin oni ne vidis tie.
 - Mi malsamopiniis, kontraŭis kaj riproĉis la kluban prezidanton, kaj tiu forpelis min el la klubo. Disputi kun la homo, al kiu anticipi ĉiam ĉio estas konata, ne indas. Mi malamas tiujn, kiuj ĉion scias. Mi ne ŝatas la irantojn antaŭen. Ekvidinte tian, mi ĉiam tiras tiun malantaŭen. Tamen mi plej malŝatas la ordinarajn, simplajn geesperantistojn. Ĉu ili estas bezonataj? Estu ĉiuj eksterordinaraj. Sed tiujn, la eksterordinarulojn, mi entute malamas. Sufiĉas. Mi iros al Bjalistoko, por serĉi tie la veron kaj justecon, – mi klarigis al mia edzino la situacion.
 - Por la vespermanĝo estu hejme. Je kioma horo vi revenos? – demandis la edzino.
 - Dolorigis min ŝiaj vortoj. Kion ŝi pensas? La geografion ŝi ne scias, Bjalistokon.
 - Foririnte, ne vagabondu ie ajn, ne diboĉu! – avertis min la edzino. – Iru kaj trovu tiun, mi ne scias kiun, kiu...
 - Kaj kio estu tiam? – mi demandis.
 - Provu pace, amike interkonsenti, sed se tiu ne subiĝos – batu lin. Kion vi volas, tion faru... Iru, – respondis mia edzino. – Tamen sciu, ke ĉiuj vagabondoj kaj trampoj, migrintaj tra la tuta mondo, finfine komprenas, ke la vero kaj feliĉo estas hejme.
 - O-ho! – ekmiris mi. – Eble ankaŭ al mi tiel okazos... Sed kiel la feliĉo povas aperi hejme? Kie ĝi povas esti? Ĉu vi komprenas, kion vi parolas?

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nuntempa hispana poezio:

Armando Silles McLaney

de Miguel Fernández

Kurioze, mian kontaktiĝon kaj postan amikecon kun nuntempaj hispanlingvaj poetoj mi ŝuldas ĉefe al Esperanto, al la fakto, ke mi estas Esperanto-poeto, kies verkoj, ekde mia esperantistiĝo en 1980 ĝis antaŭ nelonge, nome ĝis la jaro 2020, konceptiĝis kaj ricevis publikigon nur en Esperanto. Ja tio vekis scivolon ĉe ne malmultaj hispanlingvaj kolegoj. La personecon – kune kun kolekto da mikronoveloj en mia esperantigo – de unu el ili, Alberto García-Teresa, doktoro pri hispana filologio kaj kultura aktivulo, krom plurfaka verkisto, ĉefe pri poezio (li estas parto de la koro kaj animo de la skolo t.n. “poezio pri la kritika konscienco”), mi prezentis al la legantoj de *La Ondo* en la №315. Nu, en 2017 li estis petata de la homo, kiun mi tuj prezentos al vi, pri kontaktigo kun mi. Kaj de tiam ni ĝuas amikecon fruktodonan ĉefe sur la literatura tereno.

Temas pri la madridano Armando Silles McLaney. Li, naskiĝinta en majo 1968, kvankam aĝe pli proksima al la generacio de mia propra filino – nur kvin jarojn pli juna ol li – ol al la mia propra, fariĝis unu el miaj plej bonaj kolegoj kaj amikoj. Krom “denaska poeto”, Silles McLaney estas instruisto pri hispana literaturo kaj kultura aktivulo senlaca kaj efika. Elstaras lia laboro kiel gvidanto de la ĉiuvendreda jam de longe elsendata programo *Olvida tu equipaje* [Forgesu vian bagaĝon] ĉe la libera memmastrumata radiostacio *Radio Utopía*, kie mi, kiel Esperanto-poeto de li invitita, iam tiam havas la honoron kaj plezuron kunlabori kun li. Fojfoje li starigas specialajn poeziajn aranĝojn kun ĉeesto de publiko, ĉu en la radiostaci-studio, ĉu ĉe la Madrida Ateneo, unu el la plej prestiĝaj kulturejoj en la hispana ĉefurbo.

Neforgeseblas la prezentoj faritaj en tiuj lokoj, kun partopreno de gravaj figuroj de la nuntempaj engaĝiĝintaj poezio kaj kanzonarto. Tielis *Poetas por el clima* [Poetoj por la klimato], pluropa deklamado defende de nia planedo. Tielis *Poetas contra la guerra, palabra contra la barbarie* [Poetoj kontraŭ la milito, vortoj fronte al barbareco], kadre de programo bonege gvidata de Silles McLaney, kie ni, ne magra grupo da poetoj, kondamnis per niaj versoj la invadon de Ukrainio kaj ĉiujn militojn (entute ĉirkaŭ sesdek nuntempe en la mondo!). Tielis *Homenaje al Pueblo Saharaui* [Omaĝo al la popolo de Okcidenta Saharo] ĉe la Madrida Ateneo. Tielis la lasta el la tiukadre prezentita aranĝo, *Poesía por Palestina. Versos contra el genocidio* [Poezio por Palestino. Versoj kontraŭ la genocido], kie ni, grupo da pli ol



Armando Silles McLaney (Foto: Tofiño)

dudek engaĝiĝintaj poetoj, verse solidariĝis kun la masakrata Palestina Popolo kaj kondamnis ties sisteman genocidon far la Israela Ŝtato.

Armando Silles publikigis ĝis nun tri poemarojn: *Aire verdadero* [Vera aero], *Palabra. Cartas a mi padre muerto y otros alegres poemas* [Vortoj. Leteroj al mia mortinta patro kaj aliaj gajaj poemoj] kaj la ĵus aperigita ampoemaro *Libro de la impaciencia y la pesquisa* [Libro pri senpacienco kaj enketado], kiun mi havis la honoron prologi. Aliflanke, li verse partoprenis en pluraj (preskaŭ dekkvino da!) poeziaj antologioj. Malgraŭe, la plej granda parto de lia poezio restas ankoraŭ neeldonita.

Pluraj poemoj de Silles McLaney ricevis tradukojn en la anglan, en la francan kaj, memkompreneble, en Esperanton. Mi mem respondecas pri la esperantigoj de ses el ili, prezentitaj, kune kun noto pri liaj personeco, verkaro kaj agado, en №32 de *Beletra Almanako*. Aliflanke, ne malmultaj el liaj poemoj ricevis muzikigojn por la repertuaroj ĉu de kantpoetoj, ĉu de korusoj.

Cetere, mi ŝuldas al li eternan dankon pro lia mirinda prologo kuntekste de mia unua poemaro en la hispana lingvo, *Semilla de arbol*, antologio de miaj poemoj, en mia elesperantigo, aperintaj de 1993 ĝis 2020, jaro, en kiu la libro, publikigita de la hispana eldonejo *Calumnia Edicions*, vidis la lumon.

Por la nuna prezento de Armando Silles McLaney kaj ties poezio al la legantoj de *La Ondo*, mi plukis 12 erojn el poemkolekto elektita de la poeto mem por baldaŭa libroforma publikigo en tri lingvoj: la hispana, la portugala kaj Esperanto.

Jen ili en mia esperantigo:

Poemoj de Armando Silles McLaney

SURSTRANDA PROMENADO

Surstrande mi trovis
bukcenojn, unikornojn, konkojn,
skarabojn, plantojn, dunojn,
korkojn, ŝnurojn, lignopecojn,
akvon, venton, sunon,
homojn, benzinujojn, ŝipojn,
savtabulojn
kaj elektran lampon.

SURPRIZOJ

Mi memoros dum mia tuta vivo
la ĵus pasintajn tagojn,
la surprizon, la konfuzon kaj la ĝojon,
vian rigardon de knabin' sovaĝa,
viajn dolĉajn kisojn en la mateniĝo,
mian iel stultulan timon,
ĉiujn kaŝajn vizitojn kaj la ridojn,

La tutan vivon mi konscios pri tio, ke ne eblis
por ni ĉiuj aferoj okazintaj,
pri l' feliĉa hazardo, kiu nin kontaktigis,
pri la granda fortuno havi vin,
pri la proksimeco al vi, kiun mi sentas
ĉe viaj brakoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Denove 100 libroj. Sen Britio

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo de Esperanto* ĉiujare publikigas statistikon de la libro-produktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en *Hungara Vivo*. Por tiuj malmultaj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” (LA) de la revuo *Esperanto*, en kiu estas registrataj ĉiuj paperaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro. Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en LA estas registrataj libroj, eldonitaj pli frue sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵon kaj fideinde vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn librojn, kaj en LA kutime mankas lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste Aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado tra libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj kaj eldonejoj (kutime, senpage) ofertas sen zorgi pri paperaj eldonkostoj. Tio reduktas la paperan rikolton. Sed mankas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”. Vidu la rezulton.

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2021	2022	2023	91-2022 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	106	100	100	5.791
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	16.088	15.871	19.116	807.132
Averaĝa paĝonombro de libro	120,3	145,2	155,7	151	158,7	191,1	139,3
Averaĝa prezo de libro (eŭroj)	8,20	11,40	12,10	13,22	14,45	16,6	10,61
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	6	9	5	795
Originala beletro	258	214	213	25	19	19	748
Traduka beletro	458	361	330	21	47	32	1249
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	12	4	8	638
Eo: historio, kulturo, movado...	241	299	173	13	8	9	743
Politiko, historio, socio	166	228	248	15	11	10	678
Scienco kaj tekniko	182	93	33	6	1	3	318
Religio	105	93	72	4	1	10	285
Aliaj temoj	172	107	50	4	0	2	335

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2008	158	25.381
1992	205	25.789	2009	158	24.272
1993	136	18.511	2010	204	28.232
1994	188	22.078	2011	172	19.775
1995	200	23.345	2012	153	23.144
1996	232	28.637	2013	178	25.344
1997	273	27.727	2014	107	14.024
1998	208	28.769	2015	172	25.629
1999	208	24.460	2016	189	32.323
2000	235	25.869	2017	139	23.353
2001	222	31.520	2018	127	19.483
2002	174	26.451	2019	150	28.194
2003	224	28.424	2020	78	16.906
2004	183	27.295	2021	106	16.088
2005	159	23.780	2022	100	15.871
2006	204	30.078	2023	100	19.116
2007	184	31.183			

En 2023 surmerkatigis 100 libroj, samkiom en 2022. La ĝenra distribuo (vidu la tabelon en la antaŭa paĝo) rekonfirmas, ke nun aperas malpli multaj lerniloj ol antaŭe, ja nun oni pli lernas Esperanton rete, sed ne per paperaj libroj.

Grava manko en “Laste Aperis”

La Novjorka eldonejo Mondial revenis al la unua loko kun 16 libroj, inter kiuj estas tri numeroj de *Beletra Almanako*, du de *Esperantologio* kaj du *Beletraj Rikoltoj*. Ĝin devintus sekvi la pasintjara “ĉampiono”, Esperanto-Asocio de Britio, kun 14 libroj, pri kiuj Tim Owen rakontis en la decembra *Ondo*, sed neniom da libroj de EAB estis registritaj en LA, kaj do la jara librosumo en 2023 estas ne 114, sed nur 100 volumoj. Jen elokventa ekzemplo de la mankhava bazo de nia statistiko – sed pli bonan ni ne havas.

2023. Libroj		2023. Paĝoj	
Mondial (Usono)	16	Mondial	4821
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	9	Ars Libri	2164
Ars Libri (Pollando)	6	KAVA-PECH	1305
SEA Lorenz (Brazilo)	5	SEA Lorenz	1093

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kaj la Oskaro venas al...

de Wolfgang Kirschstein

Aparte riĉa. Tio estas la resumo de la pasinta filmsezono, kaj tio ankaŭ videblas en la listo de nomumoj por la plej bona filmo de la jaro. La disdonceremonio de la premioj tamen ne estus vere interesa, ĉar manpleno da filmoj aperis en preskaŭ ĉiuj kategorioj.

Barbenheimer

Oppenheimer de Christopher Nolan kiel “la plej bona filmo” de la jaro tute ne estis vera surprizo. La filmo aperis entute en 13 kategorioj kaj gajnis en sep. La bilda aspekto de la filmo estas sendube impona, aparte en la unua duono, tamen ĉi-foje ne estas tiom da kolor-eksplodoj kiel kutime en la filmoj de Nolan. La vivo de J. Robert Oppenheimer ne estas rakontita en kronologia sinsekvo. La ŝanĝo inter koloraj kaj nigrablankaj sekvencoj estas senchava (koloraj scenoj prezentas la vidon de Oppenheimer). Do, prefere ne spektu la filmon se vi estas laceta. Por mi la dua parto, kiu temas pri la duboj de Oppenheimer post la fino de la Dua Mondmilito en Eŭropo estis la plej interesa. Espereble Christopher Nolan estonte pli dediĉas sin al ĉambroludoj. La elstara aktorado de Cillian Murphy kiel la “homo kun ĉapelo kaj pipo” kaj la partituro de Ludwig Göransson restos longe en mia memoro. Eble ni estas je la sojlo de la Tria Mondmilito. Tial scio pri la “patro de la atombombo” estas bedaŭrinde nepre necesa.



Holivudo kutime zorge dozas la aperigon de furoraĵoj, sed *Oppenheimer* kaj *Barbinjo* (Barbie) de Greta Gerwig premieris la saman semajnfino. *Barbinjo*, la fama pupo, lacas pri la vivo en Barbinjolando kaj volas malkovri la “veran mondon”. Neatendite ŝia kunulo Ken akompanas ŝin dum tiu esplorvojaĝo. Mi konfesas, ke mi unue ne intencis spekti ĉi tiun filmon, sed finfine la kuriozemo kaj la kompletisto en mi tamen venkis. Mi ne bedaŭras, ke mi vidis ĝin. *Barbinjo* tute ne estas omaĝo al plastika pop-kulturo, sed plenplenas je bizaraj situacioj kaj subfosa humuro. Gerwig ludas kun ĝenraj kliŝoj, sed ankaŭ kritikis, kiel imagaj idealoj malhelpas al *Barbinjo* vere viriniĝi. *Barbinjo* estas neatendite kontentiga filmo.

La vera Barbinjo kaj aliaj vivoj

La greka reĝisoro Yorgos Lanthimos estas jam longe konata inter ŝatantoj de artfilmoj. Ĉi-jare lia plej lasta filmo *Kompatindaj Kreaĵoj* (Poor Things) estis



plenmerite sukcesa ĉe la kinokasoj. La intrigo estas kvazaŭ rerakonto de la fama gotika romano *Frankenstein*. Bella re-surektas, kiam freneza sciencisto transplantas beban cerbon en ŝian kapon. Rapide Bella plenkreskas kaj viriniĝas. Ŝi legas abunde, evoluigas liberan volon kaj socian konscion, mallonge: emancipiĝas de kreaĵo al memstara virino. La filmo estas purega delico: arte cizelitaj spritaj dialogoj, multaj neatenditaj turniĝoj de la intrigo, abunda scenografio kaj elstarega aktorado. Emma Stone tute juste ricevis la premion kiel la plej elstara aktorino. Dorlotu vin kaj nepre spektu tiun filmon.

Majstro (Maestro) estas pli malpli konvencia biografia filmo pri la vivo de la komponisto kaj dirigento Leonard Bernstein de Bradley Cooper, kiu ankaŭ ludas la ĉefrolon. La scenaristoj elektis la edziĝon de Bernstein kun Felicia Montealegre kiel centran temon kaj ruĝan fadenon. Tiu edziĝo estis komplika, ĉar Bernstein dum sia vivo havas flankajn amaferojn kun anoj de ĉiuj disponeblaj genroj. Tamen la filmo insistas, ke Felicia estis la centro de la vivo por “poliamora” Bernstein. Por pli simili al Bernstein la ŝminkistoj preparis por Bradley Cooper protezan nazon. Komence estis iom da kritikaj voĉoj pro ‘judvizaĝigo’, sed tio rapide forgesiĝis, ĉar la rezulto estas mirinda: Cooper estas Bernstein. La aktorado de Cooper estas elstara (ekzemple en la impona sceno en la katedralo de Ely, kiam li entuziasme kondukas la orkestron en la glora fino de la dua sinfonio de Mahler). Tamen postrestas la sento, ke la titolo de tiu filmo devus esti Felicia.

Marĝenuloj

Usona Fikcio (American Fiction) de Cord Jefferson estas sufiĉe amuza, jes eĉ satira fimo pri kliŝaj rasaj atendoj. Thelonus ‘Monk’ Ellison estas ambicia verkisto de altnivela literaturo, sed la recenzantaro (kaj la librovendejoj) etikedas lin kontraŭ lia volo kiel uson-afrikan verkiston. Li verkas pseŭdonime firomanon kun ĉiuj stereo-tipoj. La kritikantoj tuj laŭdas la verkaĉon kiel aŭtentan voĉon de socia marĝenulo. Kompreneble, la situacio akriĝas, ĉar Ellison inventas la fikcion, ke la fikcia verkisto estas fuĝanta krimulo. La filmo ofertas plurajn finaĵojn. *Usona fikcio* estas kontentiga satiro kaj plukis la premion por la plej bona adaptita scenaro.

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humuristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Neserioze pri elektoj kaj balotoj

Korniko trovis pecon da fromaĝo, eksidis sur arbo kaj antaŭĝuas la manĝon. Venas vulpo: “Korniko, ĉu vi voĉdonos por nia prezidento?” La korniko silentas. “Nu, vere, ĉu vi subtenos lin?” La korniko plu silentas. “Estas tre simpla demando, nur unu vorto – ĉu vi donos vian voĉon al nia ŝtatestro aŭ ne?” La korniko ne eltenis: “Jes!” La fromaĝo falis sur la teron, la vulpo kaptis ĝin kaj tuj forkuris. La korniko grumbliis al si mem: “Eĉ se mi dirus *ne* – kio ŝanĝiĝus?”

Du uloj diskutas.

– Kiun politikiston elekti – ĉu riĉan aŭ malriĉan? Mi pensas ke malriĉulo estas pli fidinda.

– Tute ne, li ne havas monon, do li koncentriĝos je ŝtelado.

– Ĉu mi voĉdonu por riĉulo?

– Sed li akiris sian monon per ŝtelado kaj rabado, do certe li daŭrigos tion je ŝtata posteno.

– Do por kiu voĉdonu ordinara homo kiel mi?

– Kara, memoru, ke tio estas libera elekto!

Kiel logi la voĉdonantojn al balotejoj? Proponu elekti, kiu politikisto estu malliberigota, kaj venos 100%!

Al pasaĝero en aviadilo venas stevardino:

– Ĉu vi deziras manĝi?

– Mi deziras. Kion mi povas elekti?

– Jes aŭ ne.

Kio estas diferenco inter vizito de bordelo kaj balotejo? En bordelo vi unue elektas kaj poste fikas tiun, kiun vi elektis. En balotejo vi elektas tiun, kiu poste fikos vin.

La unua demokratia baloto okazis jam en paradizo. Dio venigis Evan al Adamo kaj diris: “Nu, elektu vian edzinon...”

Etulo demandas la patron: “Ĉu ĉiuj fabeloj komenciĝas je la vortoj “En iu reĝlando vivis...?” – “Ne, kara mia. Plej amuzaj fabeloj komenciĝas per: “Se vi elektos min, mi faros jenon...”

Sincera politikisto respondas al demando: kial li decidis kandidatiĝi: “Niaj regantoj ŝtelas, mensogas, rabas!” – “Ĉu vi esperas ĉesigi tion?” – “Ne, mi deziras tion partopreni!”

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Trista farso

La konflikto inter Israelo kaj Hamas farsis preskaŭ mil mortintojn en 48 horoj. (J. Le Puil. *La Kuracoservo // La KancerKliniko*, 2023, №187, p. 5)

Ni, paŝo posto paŝo, post longa laboro

Esperanto por mi. Red. Hori Jasuo. <...> Unupaŝaj prezentoj akompanataj de kolora foto kaj nigrablanka desegnaĵo. (*Esperanto*, 2023, №9, p. 176; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Tempo haltis, aŭ: La vana atendo

... la minutmontrilo jam staris sur la sepa. Tia malvenis la ĝusta momento... (Mati Unt. *La foriro de Helgi Sallo // La Kancerkliniko*, 2023, №186, p. 5)

Kio restas de Nederlando?

Ĉirkaŭ Ede troviĝas multe da erikejoj (kompare al la resto de Nederlando). (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Ede>)

Ĉu mankis melodio?

La jam konata Esperanta kantisto Joel Muhire (Joe Mo) verkis la tekston kaj komponis la tekston por la kanto Bonvenon al la 109-a UK. (*Migranta Hirundo*, 2023, №1, p.2; trovis Ionel Onet)

Kaj semas konstante

De Bertin kaj la knabino semtempe enkuris. (Jenő Rejtő. *La dekkvar karata aŭtomobilo* / Trad. László Balázs, libro.ee/file.php?id=2881)

Aŭdacaj palpoj

Tiu rekomendo fingrumis la pintan organizaĵon de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Scienco, Kulturo [tiele!] kaj Eduko. (Emile Malanda. *Dr. Kongo: Esperanto kaj UNESKO // Esperanto en Afriko*, 2023, №46, p. 9)

That's how she did it

La avino, kune kun juna social disciple Vladimir Bepalov, fondis en Soĉi Esperanto-klubon. (*Irina Gončarova festas jubileon! // Ponto*, 2021, №121, p. 2.; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

La fina malvenko?

La kunveno mem estis multlingva, kun simultana interpretado en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (angla, araba ĉina, franca, hispana, rusa), plus Esperanto. (*Esperanto kaj UN*, 2023, №65, p. 1; rimarkis Lu Wunsch)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 132-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>